


La partoprenantoj de la 17-a Rata Rendevuo
en Hessisch Oldendorf kaj Fischbeck, septembro 2020



**Foje ŝanĝu vian perspektivon!** Estas facile juĝi homojn kiuj troviĝas en alia situacio, ekzemple homojn kiuj vivas en mizero. *“Estas ilia propra kulpo! Ke ili laboru!”* estas ofte aŭdataj riproĉoj. Tamen, vivante en komforto, malfacilas vere kompreni kiamaniere homoj eniris tian situacion, ne ĉiam proprakulpe, kaj malfacilas kompreni kial ili ne sukcesas eliri sian mizeron.




Foje ŝanĝu vian perspektivon!

Simile en konfliktoj, ĉu inter landoj, ĉu inter geedzoj, najbaroj, ĉu ankoraŭ aliaj: ambaŭ partioj rakontas siajn proprajn verojn; siajn proprajn versiojn de la realo. Sed, kio estas la realo por ili? Ofte, la tiel nomata “realo” estas ilia (subjektiva) interpreto de ilia mondo, vivosfero, situacio aŭ spertoj, kiuj por ili en tiu momento estas la nura, pura realo. Malfacilas do konvinki ilin pri sia malpraveco — se entute estas ili kiuj malpravas! Ĉiel ajn, plej gravas, antaŭ ĉio, provi kompreni la alian partion. Kiam venis kompreno, kaj oni esprimas tiun komprenon, eblos pli juste solvi konfliktojn. Ofte estas ĝuste la nekomprenemo kiu frustrigas kaj kolerigas kaj ne la konflikto mem. https://movado-sen-nomo.weebly.com/



Retkunvenaj impresoj

# RATKAPTISTA KURIERO


INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 63 DECEMBRO 2020



Kontakto: Heinz W. Sprick, Schmiedeecke 2, 31840 Hess.Oldendorf
hameln@esperanto.de esperanto.de/hameln eventaservo/o/RB tel:0162/7536396


Esperanto La Ratkaptista Bando
Esperanto-Gruppe Hameln

## Termine 2021 mittwochs 19.00-21.00 Uhr

**Virtuell** **und, sobald es möglich ist, wieder in der** **Sumpfblume Hameln**

**2021: 6., 20., 27. Jan., 10., 17., 24. Feb., 10., 17., 24., 31. Mrz., 14., 21., 28. Apr., 12., 26. Mai, 9., 23., 30. Jun., 13., 28. Jul., Sommerpause, 8. 22., 29. Sep., 13., 27. Okt., 10., 24. Nov., 8., 15. Dez., Weihnachtspause**

*Das aktuelle Programm findet ihr unter:*

***esperanto.de/hameln + eventaservo.org/o/RB***

## Neuer Esperanto-Kurs startet am 18. Januar 2021!

Der noch laufende virtuelle Kurs für Anfänger ist fast beendet und da es momentan noch nicht absehbar ist, wann wieder ein Kurs vor Ort stattfinden kann, findet jetzt ab dem 18. Januar immer montags von 19.00 bis 20.30 Uhr ein neuer Kurs per Zoom statt. Anmeldung bitte direkt bei Heinz oder über hameln@esperanto.de
Auch der Start des Frühjahrssemesters bei der VHS ist auf Anfang April verschoben. Daher erst am 27. April: Esperanto-Luft schnuppern mit dem Rattenfänger, VHS HM.






Karaj klubanoj kaj amikoj de la Ratkaptista Bando!
**Kia jaro estis tiu ĉi jaro 2020?**
Ĉiu el ni certe planis multajn aferojn, kaj pro la kronvirusa pandemio certe nuliĝis multaj de niaj revoj. Ankaŭ nia klubo ne povis kunveni surloke. Sed malgraŭ ĉio: bonŝance ni malkovris la eblecojn uzi la virtualajn ĉambrojn. Ankaŭ multaj gastoj riĉigis niajn kunvenojn. Kaj kelkaj el ni flugis al aliaj kluboj kaj iĝis „Retkolibroj“! Bonŝance dum la somero kaj aŭtuno ni tamen povis kunveni surloke: dum la ĝardena festo ĉe Waltraut kaj Klaus, en la Sumpfblume, private kaj dum la Rata Rendevuo! Ni estu dankemaj pro tio. Nun mi deziras al vi ĉiuj: Feliĉan kristnaskon kaj bonan novan jaron 2021! La estonta jaro estu pli bona ol la pasinta! Vi ĉiuj estu sanaj kaj ne perdu la esperon! Ĝis baldaŭ, Heinz

### Ĝuu la simplajn aferojn.

Tio, kio ne bonas, ĉiam tuj videblas. Tio, kio jes bonas, ni konsideras evidentaĵo. Tamen valoras la penon rimarki kaj nomi tiujn ĉiutagajn aferojn, kiuj ĝojigas nin en tutsimpla tago. Ekzemploj de tiuj etaj feliĉaĵoj povas esti: trinki teon el taso de la avino, promeni en florplena ĝardeno, vagi tra nekonata urbo… Pripensu do kio ĝojigas vin. Vi pli ĝuos la vivon kun sento de dankemo pro la etaj ĉiutagaĵoj. https://movado-sen-nomo.weebly.com/



**Jahreshauptversammlung 2021 ?** > Normalerweise erfolgt immer zu Jahresbeginn die Einladung zu unserer Jahreshauptversammlung. Da auf Grund der Pandemie-Lage im Moment überhaupt noch nicht absehbar ist, wann wir wieder vor Ort zusammen kommen können, kann ein Fixtermin noch nicht festgelegt werden. Der Gesetzgeber hat im „Gesetz zur Abmilderung der Folgen der COVID-19-Pandemie" festgelegt: Gemäß § 5 Abs. 1 bleibt der Vorstand bis zu Abberufung im Amt, auch wenn dies nicht ausdrücklich für solche Sonderfälle in der Satzung geregelt ist. Auch die Durchführung in digitaler Form ist gesetzlich bis Ende 2021 ermöglicht worden und stellt eine Alternative dar, falls eine Präsenzveranstaltung auf unabsehbare Zeit unmöglich bleibt.
Trotz allem hoffen wir, dass wir uns vielleicht im April, spätesten im Mai wieder treffen können und dann auch eine Jahreshauptversammlung vor Ort möglich sein wird.


Malferma Tago ĉe UEA en Roterdamo novembro 2019

## Esperanto-Kalender: eventaservo.org/

Da momentan noch keine Treffen vor Ort stattfinden können, ist auch der Veranstaltungskalender für 2021 sehr knapp gehalten und es sind nur die großen Veranstaltungen eingetragen. Trotzdem sollte kurzfristig vorher noch einmal kontrolliert werden, ob sie stattfinden können. Alle Veranstaltungen, besonders auch die virtuellen, die jetzt in großer Zahl stattfinden, findet ihr im Esperanto-Kalender: eventaservo.org/


Antaŭkristnaska festo en la Pfannekuchen decembro 2019

**2021:** **2.-9.4. PSI Intern. Frühlingswoche in Braunschweig; 12.-16.5. BARO in Hameln;** 13.-16.5. Kongreso de Espéranto France en Trellisac, FR; **21.-28.5. Brückenkongress (Deutscher, Polnischer und Eisenbahner-) in Frankfurt/Oder;** 3.-10.7. BET-67 Baltaj Esp.-Tagoj en Jelgava, LV; **9.-17.7. SES Somera Esperanto-Studado en Kroměříž, CZ;** 10.-17.7. 54-a Kongreso de ILEI (instruistoj) en Edinburgo, GB; **17.-24.7. 106-a Universala Kongreso en Belfasto, GB;** 22.7.-1.8. Renkontiĝo de Esp.-familioj en Ispánk, HU; 25.7.-1.8. 94-a SAT-Kongreso en Bjalistoko, PL; **26.7.-1.8. 77-a IJK Internacia Junulara Kongreso en Kievo, UA;** 16.-22.8. 22-a Internacia Renkontiĝo en Pluezek, FR; 20.-27.8. 87-a Itala Kongreso en Assisi, IT; **30.9.-4.10. 20-a KoKoLoRES (Spieletreffen) in Schwerte; 17.-22.10. 9-a EMA (Wandertage) in Neustadt/Weinstraße;** 19.-21.11. Studosemajnfino en Bornerbroek, NL;



**Heinz-Wilhelm Sprick**

Pandemio > izoliĝo,
sen kunvenoj > nur frustriĝo!
Sed bonŝanc' – novaj ideoj
ekaperis! – Kiel feoj
virtuale nun ekflugis
retkolibroj! – Ne enuis:
ili flugis de IJK
al la SES, VEKI kaj VK,
ne maltrafis la kunvenojn
klubajn en London'. – Sidnejon
ankaŭ ili spektis ĝue.
Venis rete jam tre frue
gastoj el plej fora lando
al la "Ratkaptista Bando".
Dankon al Eventaservo,
kiu ja per pen' kaj vervo
helpis nun multajn aliajn
venki krizojn pandemiajn!

## 17-a Rata Rendevuo en Hessisch Oldendorf

Longe ni hezitis pro la kronvirusa pandemio, ĉu eblos aŭ ne eblos okazigi la Ratan Rendevuon en tiu ĉi freneza jaro. Finfine ni mallonge antaŭe ni decidis: jes, ni faru!

Jam la 17-an fojon la Ratkaptista Bando invitis geamikojn al la Rata Rendevuo. Ĉi-foje jam la trian fojon al Hessisch Oldendorf. Venis krom la klubanoj ankaŭ amikoj el Lage, Nieheim, Bielefeld, Hannover, Hamburg, Bremen kaj Lemwerder. Entute 18 homoj venis al la Skulptura Parko en Hessisch Oldendorf. La artistino Gisela Mewes kaj ŝia edzo bonvenigis nin, rakontis pri la transformigo de sovaĝa arbareto al ebena tereno kun bela lageto kaj multaj skulptaĵoj el diversaj materialoj. Interese ili priskribis la diversajn skulptaĵojn kaj ankaŭ la frenezan batalon kontraŭ diversaj subdistriktaj leĝoj kaj reguloj. Sed la kuraĝo kaj la kreemo de la paro ne ĉesis. Pleje certe impresis ĉiujn la granda fiŝego meze en la lageto kaj la rakonto, kiamaniere ĝi iam estis transportita sur iom malpli granda remorko.




Ĝardena festo en Bensen, julio 2020

Post eta promenado tra la urbocentro de Hessisch Oldendorf ni atingis la restoracion „Ratsstuben". Bedaŭrinde tie ni estis la lastaj gastoj, ĉar la jam iom pli aĝa paro post tiu tago fermis la restoracion pro manko de posteulo. Tamen ni ankoraŭ bone manĝis kaj ĉe diversaj tabloj bone povis babili unu kun la aliaj. Kompreneble ĉie ni atentis la pandemiajn regulojn pri maskoj kaj distanco.
Poste per privataj aŭtoj ni veturis al la vilaĝo Fischbeck por tie viziti la Virinan Kolegiaton (Stift) Fischbeck. En du grupoj po naŭ personoj la abatino kaj unu el la naŭ kolegiataj damoj ĉiĉeronis tra la preĝejo kaj ankaŭ tra la tereno kun la belegaj kolegiataj ĝardenoj. Ni povis vidi, ke dum la pasintaj jaroj multe ŝanĝiĝis, multajn domojn oni renovigis kaj ankaŭ la ĝardenoj ricevis strukturojn simile al tiuj, kiujn ili havis en monaĥejoj dum la mezepoko. Sed tamen restas ĉiam aferoj, kiuj estas farendaj. Bedaŭrinde ĉi-jare ankaŭ ĉi tie ne povis okazi la kutimaj koncertoj en la preĝejo. Cetere: al la komunumo de la kolegiataj damoj rajtas nur aliĝi virino, kiu ne aŭ ne plu havas edzon. Kune ili tie pasigas la vivon en komunaj laborado kaj kreo je Dio. Fine ni ankoraŭ ĝuis varman kafon kaj bongustajn tortojn aŭ kukojn en la apuda kolegiata kafejo. Ĉiuj ĝuis la tagon kaj ni post longa tempo denove eblecon kunveni surloke kaj Esperantistojn.

ankaŭ tion, ke havis la renkonti aliajn


Unua kunveno post la unua trudizoliĝo Sumpfblume, junio 2020


Kuna manĝado post la somera paŭzo Me Lounge, septembro 2020

| Ho-moj | Landoj | ĉe | RB |
|---|---|---|---|
| 82 | Germanujo | DE | 1 |
| 12 | Brazilo | BR | 2 |
| 9 | Francujo | FR | 3 |
| 9 | Belgujo | BE | 4 |
| 7 | Usono | US | 5 |
| 6 | Nederlando | NL | 6 |
| 6 | Hispanujo | ES | 7 |
| 5 | Britujo | UK | 8 |
| 5 | Rusujo | RU | 9 |
| 4 | Israelo | IL | 10 |
| 4 | Hungarujo | HU | 11 |
| 3 | Pollando | PL | 12 |
| 3 | Irano | IR | 13 |
| 3 | Svislando | CH | 14 |
| 3 | Kanado | CA | 15 |
| 2 | Armenujo | AM | 16 |
| 2 | Litovujo | LT | 17 |
| 2 | Ĉeĥujo | CZ | 18 |
| 2 | Benino | BJ | 19 |
| 2 | Burundo | BI | 20 |
| 1 | Turkujo | TR | 21 |
| 1 | Aŭstrujo | AU | 22 |
| 1 | Barato | IN | 23 |
| 1 | Ĉilio | CI | 24 |
| 1 | Dominika Respubliko | DO | 25 |
| 1 | Italujo | IT | 26 |
| 1 | Kolombio | KO | 27 |
| 1 | Kroatujo | HR | 28 |
| 1 | Meksiko | MK | 29 |
| 1 | Peruo | PE | 30 |
| 1 | Slovakujo | SK | 31 |
| 1 | Slovenujo | SI | 32 |
| 1 | Suda Koreujo | KR | 33 |
| 1 | Svedujo | SE | 34 |
| 1 | Togolando | TG | 35 |
| **entute:** | | | |
| **186 homoj el 35 landoj** | | | |
| **37 kunvenoj** | | surlokaj | 11 |
| **en 2020** | | virtualaj | 20 |
| **ĝis 16.12.** | | hibridaj | 6 |